WIKIPEDIA

Frankoj

Tiu ĉi artikolo temas pri la antikvaj triboj de la frankoj. Por la signifo “franco”, vidu Francujo.

La **Frankoj** estas grupo de ĝermanaj triboj, kiuj loĝis en la unua jarcento en la suba valo de Rejno (la fontoj mencias ilin unuafoje dum la jaro 258, kiam regis la romia imperiestro Probo). Ili laŭgrade penetris Gaŭlion kaj ekloĝis sur la dekstra parto de Rejno dum la 3-a jarcento. Post la kolapso de Romio en la 5-a jarcento, ili konkeris tutan Gaŭlion kaj Kloviso fondis la *Frankan Imperion* (vidu *Merovidoj*). En la teritorio de la hodiaŭa Germanio dum pluraj generacioj la Frankoj batalis kontraŭ la konkurenca ĝermana tribaro saksoj, sed dum la regado de Karolo la Granda la frankoj venkis la konkurantan tribaron. La moderna Francio prenis de la Franka Imperio sian nomon.

Jam dum la 5-a jarcento la frankoj kultivis kampon kaj bredis bestojn. La agroj estis en komuna kultivado. Parto de la tribaro asimiliĝis al la gaŭloj, kaj el ambaŭ gentoj iĝis komuna nord-francia popolo. Alia parto de la frankoj asimiliĝis al la Ĝermanoj.

Galerio

Historio de Francio

Antikva epoko

- Gaŭlio
- Frankoj

Mezepoko

- Merovidoj
- Karolidoj
- Kapetidoj
- Valois (rektaj)

Moderna epoko

- Valois-Orléans
- Valois-Angoulême
- Burbonoj

19-a / 20-a jarcentoj

- Franca Revolucio
- Unua Respubliko
- Unua Imperio
- Unua Resurtronigo
- Cent-Tagoj
- Dua Resurtronigo
- Julia Monarkio
- Dua Respubliko
- Dua Imperio
- Tria Respubliko
- Reĝimo de Vichy
- Provizora registaro

Okcidenta Eŭropo, 870: La imperio de Karolo la Granda pluvivis post lia morto kaj kovris la plejparton de okcidenta Eŭropo inter 795 kaj 843, kiam kontrakto dividis ĝin inter liaj nepoj: la centra kaj suda Frankio (verde) regiĝis de *Lotaro la 1-a*, la okcidento (flave) de *Ludoviko la Germano* kaj la oriento (ruĝe) de Karolo la Kalva.

Statuo de la franka imperiestro Karolo la Granda en Frankfurto ĉe Majno.

- Kvara Respubliko
- Kvina Respubliko

Vidu ankaŭ :

- Ekonomia historio
- Militista historio
- Aliaj rilatitaj artikoloj

Kronologio de Francio

Vidu ankaŭ

- Historio de Francio
- Historio de Germanio
- Imperiestroj de la Sankta Romia Imperio
- Listo de francaj reĝoj
- Renesanco
- Sankta Romia Imperio
- Karolida Imperio

Eksteraj ligiloj

- mapo de nordokcidenta Eŭropo dum la jaro 400 (http://www.roman-emperors.org/nouest4.htm)
- “Historio de la Frankoj” (История франков) - paĝoj ruslingvaj (http://www.krotov.info/acts/06/turskiy/grig_00.html)
- “Noblaj kaj liberaj: la Frankoj dum la mezepoko” (Edel und Frei: Die Franken im Mittelalter) - paĝoj germanlingvaj (http://www.franken-im-mittelalter.de)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Frankoj&oldid=6114738"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 14:24, 1 mar. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.